N I A V O Ĉ O
Organo de Madrida Esperanto-Liceo
Atocha 98-4°.28012 Madrid
(91) 530 87 98 persone lunde vespere
aliajn tagojn, aŭtomata respondilo
Redaktas kaj eraras Lupe Sanz
JULIO-AŬGUSTO 1997

**HEF ANGULO**

La Hispana Esperanto Kongreso kaj la Ĝenerala Asembleo de HEF okazos en Valencio la 13an de julio (10.30 horo). Tagordo: 1) Lego kaj eventuala aprobo de la protokolo de la antaŭa Kunveno. 2)Prezento kaj eventuala aprobo de la kontoj de HEF kaj de Libro-servo. 3)Prezento kaj eventuala aprobo de jar-raporto de HEF-estraro. 4)Kotizoj por 1998. 5)Elekto de nova HEF-estraro post fino de la kvarjara mandato. 6)Aljuĝo de la premio "Klara Silvernik". 7)Demandoj, petoj kaj proponoj.

Ĉe HEF-CO jam funkcias la koresponda kurso. Ĝis nun aliĝis preskaŭ 20 personoj. Fernando Moral estas la proferoso kiu helpas ilin persone aŭ telefone. Se vi havas konatulojn kiuj deziras lerni esperanton rekomendu tiun kurson. La prezo estas 15.000 pesetojn kaj inkludas lerno-libron, libron en la hispana pri esperanto, vortareto hispana-esp kaj inverse kaj kasedo kun parolekzercoj.

La libro "Pro esperanto" verkita de A. Alonso estas disdonata inter intelektuloj, politikistoj (speciale pri kulturaj aferoj) kaj diversaj eminentuloj en la kampo de lingvo instruado. Vi povas aĈeti kontraŭ 200 pesetoj.

La uzo de "internet" estas tre utila sed kelfoje kolapsas la laboron de HEF-CO precipe pro manko de laboruloj en la oficejo, pro tio la CO-anoj petas pardonon pro la prokrasto en la respondo kaj anoncas ke dum julio kaj aŭgusto kelkaj el ili ferias.

**ESPERANTO EN "INTERNET"**

Post unujara funkciado la W-paĝo de Sveda Esperanto-Federacio registris 50.000 vizitoj. Plejparto de la informoj estas svedlingvaj. Plej ofte oni vizitas "Kiosko", registron de ligiloj al 1800 gazetoj tra la tuta mondo (www.esperanto.se/kiosko/espindex,html) inter ili "ABC" kaj "El adelantado de Segovia". Serĉante gazetojn la vizitantoj ricevas, vole-nevole, instigon informiĝi pri esperanto.

Informoj pri frekvenco de internaciaj radioj, AERA estas la Asocio Esperanta-Radio-Amatoroj:
http://www.worldnet.net/~bmsala/AERA/arkiv/txt/frekvint.txt
Kurso pri HTML en esperanto: fel@knooppunt.be

Revuo "Monato" http://www.esperanto.net
Ankaŭ "Asteriks" havas esperantan paĝon:
http://www.cs.chalmers.se/~martinw/esperanto/asteriks.html
Brazila E-asocio kiu celas prezipe la disvastigon de la filozofiaj konoj pere de esperanto, e-poŝto:
aldrin@cce.usfsc.br

**HISPANIO**

Kiel en antaŭaj jaroj la "Asociación Bahai de España" havis budon en la Libro Foiro de **Madrid** kaj montris kelkajn librojn en esperanto.

82-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO
19-26 julio 1997
Adelajdo, Aŭstralio

Ni havas novaĵon pri la partopreno en UK de Adelajdo de nia kara samideano, el **Gijón**, Julio Argüelles, eble li estos la sola hispana partoprenanto en la kongreso okazonta en la plej malproksima lando.

Rafaela Urueña kaj Luis Hernández, de **Valladolid**, partoprenis el la EŬrop-unia Esperanto Kongreso kiu okazis en Stuttgart (Germanio). Luis salutis la reprezentantojn nome de HEF.

Kun la helpo de José María Rodriguez el **Córdoba** kelkaj madridanoj ekskursis al tiu-ĉi andaluzia provinco kaj vizitis diversajn belagajn vilaĝoj ene de la kalifa vojo tra la oliv-arba regiono inter Córdoba kaj Jaén.

**EKSTERLANDE**

Hungara Esperanto Asocio havas internacian korespondan kurson por progresantoj. La partoprenkotizo estas 150 guldenoj. La kotizo estas pagenda post la ricevo de la unua taskfolio al la konto ĉe UEA aŭ al Hungara Nacia Banko. Pliaj informoj ĉe: Hungara Esperanto-Asocio, pf. 193, HU-1396 Budapest

Post 30-jara laborado de Hugo Röllinger aperis la libro "Monumente pri esperanto". La aŬtoro kolektis informojn pri ĉiujspecaj ZEOj (Zamenhof/Esperanto-objektoj) kiel stratoj, placoj, parkoj, pontoj, konstruaĵoj,skulptaĵoj, ŝipoj, eĉ asteroidoj. Entute li registris 1044 ZEOj en 54 landoj de ĉiuj 5 kontinentoj. Tio postulas de li ne nur zorgan administradon se ankaŭ multe da persistemo, intuicio kaj detektiva kapablo, dank'al kiuj la nuna dokumentaro estas kompleta registro de ZEOj de la jarcento 1896-1996. La libro en havas, krom laŭlanda listo de la ZEOj kun indiko pri liaj loko kaj jaro de ekesto, ankaŭ artikoloj, en kiuj la aŭtoro rakontas kolorplenajn historiojn de multaj el ili. Madrida Esperanto-Liceo helpis al la aŭtoro en la kolektado de diversaj materialoj de Hispanio

**VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO**

ĜIS MEZE DE SEPTEMBRO ESTOS FERMITA LA SIDEJO DE LA LICEO

# FELIĈAN SOMERON¡¡¡¡¡

**VALENCIAJ KONGRESOJ**

Post la kongreso, la 14-a matene kelkaj esperantistoj de diversaj landoj pilgrimados ekde León ĝis Santiago de Compostela (Santiaga vojo dum unu semajno). Ili esperas atingi Santiagon la 25-a de julio. Augusto Casquero kaj Carmen Suárez akompanos la grupon.

Finfine ne okazos la komunan postkongresa ekskurso al Madrido kaj ĉirkaŭaĵoj ĉar kelkaj el la partoprenantoj en la kongreso venas per buso kaj vizitos Madridon.

**KONGRESOJ KAJ RENKONTIĜOJ**

7-a Internacia Kongreso de Monda Turismo. Valencio (Hispanio) 8-13 julio.
**56-a HISPANA ESPERANTO KONGRESO. Valencia (Hispanio) 8-13 julio**
82-a UK de Esperanto. 19-26 julio 1997. Adelajdo (Australio)
83-a UK de Esperanto. 1-8 aŭgusto 1998. Montpeliero (Francio)
6-a Internacian Turisman Semajnon. 3-9 septembro 1997. Valeto (Malto)

***16-25 de julio INTERNACIAJ PREUNIVERSITATAJ SOMERKURSOJ PER ESPERANTO. U. DE Santiago de Compostela: Sur la spuroj de F. García lorca, Enkonduko en la eŭropa juro, Elementa kaj praktika kurso pri astromonio. Prezo 52.000 ESP (kun ekskurso, loĝado kaj manĝoj) Limdato por aliĝoj ĝis la 1-a de julio. Adreso: Cursos Internacionales en Esperanto. Facultad de C. POlíticas. ES-15706 Santiago de Compostela. Teléfono y fax: 981 59 80 05. e-poŝto iliespnto@usc.es***

::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::

ESPERANTO LICEO DE MADRID
Atocha 98-4°
28012 Madrid
Asociación de Utilidad Pública Municipal